

# Fabloj el Ezopa Saĝo de Kalocsay




Martin Strid 2017

# Kálmán Kalocsay (1891-1976)

Hungarespo kun "tri disaj vivoj":

- Grandulo de esperanto-literaturo – poemojn, tradukojn, novelojn, eseojn, prelegojn
- Nacie fama kuracisto, infektologo kaj medicina verkisto
- Familia patro







*Inter poemaroj originalaj:*

Mondo kaj Koro 1921

Streĉita Kordo 1931

Sekretaj Sonetoj 1932

*Rimportretoj 1934*

Ezopa Saĝo 1956



*Inter poemoj tradukitaj:*

*Kantanta kamparo (popolkantoj) 1922*

*Johano la Brava (Petőfi) 1923*

*Ni kantu! (popolkantoj) 1928*

*Eterna Bukedo (el 22 lingvoj) 1931*

*Infero (Dante) 1933*

*Hungara Antologio 1933*

*Kantoj kaj Romancoj (Heine, kun Waringhien) 1969*

*Libero kaj Amo (Petőfi) 1970*

*Tutmonda Sonoro (el 30 lingvoj) 1981*

*Fabelarbo (Móricz), 2003*

K-17

K. Kalocsay

# Ezopa saĝo



## Ezopa Saĝo (1956)

Reverkitaj fabloj,  
77 poemoj.

El ili baladiĝis 55.

*(Kriterio: minimume 5  
similformajn strofojn)*



# La baladoj de Ezopa Saĝo (1)

& Apologio de La Fontaine, 296 paĝoj.

& Azena ruzo, 290.

& *El sama buĝo*, 145.

& Flugemo, 217.

& **Hermes kaj la lignohakisto**, 377.

& Inter du malbonoj, 161.

& Inter du virinoj, 217.

& Jen Rhodos, 310.

& Kankro kaj serpento, 115.

& Kien vi rajdas?, 145.

& Kurioza kulto, 145.





# & Hermes kaj la lignohakisto:

(# Leivur Øssursson: <:29> (/mi mimi reedodo doLa; dore miimimi mi; mildo dore redo doLa; dore mimi mi; (#Rekantaĵe: redo do dore mi; mire dore mimi; mimi mimi; redo doLa do mi La a )x13 ) + (&:

'1 /Faligis foje hakilon ; sian lignohakist' ;  
e2n la riveron, kaj post ; ĝi kun granda trist'  
(x: **Paŝu firme sur plank'**, ; **ŝuojn trivu ankaŭ**, ; **regu dio**, ; **kie drinkos ni sen mank'**.)

'2 rigardis sur la bordo. ; Hermes dum preterir' ; ekvidis lin, demandis: ; "Kial la suspir'?" .....

'3 Kaj, kun kompato scii;ĝinte pri l' afer', ; li orhakilon portis al ; li el la river': .....

'4 "Ĉu estas via?" "Ho, ne" — ; estis la respond'. ; Arĝenthakilon nun li ; levis el sub ond': .....

'5 "Ĉu via?" "Ne." Li portis ; je la tria foj' ; la lian. Tiun nia ; homo kun ega ĝoj' .....

'6 rekonis, kaj la dion ; kore dankis li. ; Donacis Hermes tiam ; al li ĉiujn tri. ....

'7 Feliĉe la homo iris ; for, kaj ĉe l' renkont' ; al la kunuloj gaja ; estis lia rakont' .....

'8 pri l' incident' agrabla: ; La perdo de hakil' ; fariĝis por li granda ; gajno kaj util'.  
.....

'9 [Unu el] la kunuloj, avi;dega enviul', ; sopiris gajnon saman, ; tial sen skrupul'  
.....

'10 li iris al la rivero, ; en ĝin ĵetis mem ; hakilon sian kaj la;mentis inter ĝem'. .....

'11 Nu, ankaŭ lin ekvidis ; Hermes dum preterir', ; kaj same lin demandis: ; "Kial la suspir'?" .....

'12 Kaj same, kiam li sci;igis pri l' afer', ; li orhakilon portis al ; li el la river'! .....

'13 "Ĉu via?" "Jes!" — avide ; kriis la homaĉ'. ; Malaperis dio, hakilo, ; restis la domaĝ'. .... )

8/35





# La baladoj de Ezopa Saĝo (2)

A watercolor illustration of a black and white dog standing on a wooden bridge over a stream. The dog is looking down at its reflection in the water. The background shows trees and reeds.

& La aglo kaj la vulpo, 377.

& La avarulo, 390.

& *La avida hundo*, 186.

& La cerbo, 1275 aŭ 1479.

& La ĉevalo kaj la azeno, 174.

& La enamiĝinta leono, 253.

& La flatema maro, 255 aŭ 465.

& La griloj, 394.

& La juĝo de la simio, 135.

& La juĝo de Momos, 348.

& La lango kaj la mano, 174.



# & La ĉevalo kaj la azeno:

(#: <:29> (/La LaLa LaLa SoLa Ti La;La Ti La; La doLa SoSo SoSo Ti La;La Ti La;  
(#Rekantaje: do do TiLa So; TiLa La; do do TiLa So; TiLa La a) )x6 )+ (&:

'1 /Sen ŝarĝo la ĉeval' promenis  
; fiere. ; Post ĝi azeno ŝarĝon  
trenis ; sufere,

(x:: **Gaje paŝu nun ; en la ĉen ;**  
**ĝis leviĝos sun' ; en maten'.**)

'2 kaj ĝeme petis: Kamarado, ;  
min helpu! ; Ne lasu, ke min la  
penado ; elĉerpu! .....

'3 Vi la duonon portus lude, ;  
transprenu, ; ke mi, ŝarĝita tiel  
krude, ; ne svenu!" .....

'4 Sed ridis la ĉevalo, vanis ; la  
voko, ; orgojle dancis ĝi, rikanis  
; kun moko, .....

'5 ĝis la azen' la penon jam ne  
; elportis, ; ekstumblis, falis,  
blekis: "Damne!" ; kaj mortis.  
.....

'6 Nun devis porti tiu orgojla ; la  
plenon ; de la azena ŝarĝo —  
kaj la ; azenon. ....)





# & La enamiĝinta leono:

(#: <:23> (a;Mi /LaLa TiTi dore mido Ti Ti;Mi rere TiTi dodo LaSi Ti Ti;  
(#Rekantaĵe: La Ti dore mido Ti; rere TiTi doododo LaSi La) )×11 )+(&:

'1 Kna/binon amis la leon' freneze, ;  
sin svatis ĉe la patro. Lin kompleze  
(x:: **Enamiĝis la leon' ; provis esti  
milda por ŝia bon'.**)

'2 akceptis tiu, sen plej eta ŝajno ;  
de rifuzem', kaj diris: "Granda gajno  
.....

'3 estus por ĉiu havi vin parenco, ;  
min plezurigas via nupt-intenco. ....

'4 Mi donas ŝin al vi kun ĝoja preto, ;  
sendube ... jes ... sed mia filineto  
.....

'5 estas knabin' de delikataj sentoj  
... ; timema ... nu ... kaj viaj ungoj,  
dentoj! .....

'6 Ne miru, ke ŝi tremas de vi. Sveno ;  
ŝin kaptus ja ĉe via ĉirkaŭpreno. ....

'7 Mi petas do, se vi ŝin amas vere, ;  
svatiĝi venu pli mildmaniere." .....

'9 Tuj la leon' amarda hejmeniris, ;  
ungojn tondis, dentojn li eltiris, .....

'10 kaj rerapidis al la dom' bopatra. ;  
Sed tie — stango, pugno, ŝtono akra  
.....

'11 atendis la senarman, kaj lin frapis,  
; ĝis, duonmorta, pene li eskapis. ....)

# & La flatema maro:

(#: ( # Hørpu ríma: <:31> /La La SiLa TiTi TiTi; TiLa SoFa MiMi; LaLa LaTi doTi LaTi; do Ti La a; La SiLa TiTi TiTi; TiLa SoFa MiMi; Mi LaLa LaLa LaTi; do Ti La a) ?

(#Majore: <:17> /dore mifa soso somi; rere mimi mire dodo; (#Rekantaje: dore mifa soso mi; rere mimi rere doTi La)) )x15 )+(&:

'1 (& Hørpu ríma: /Sur monteto apud maro ; (x: – **vin invitas kuri** –.) la paŝtisto pri l' ondaro (x: **Sorcĥistoj**, ; **Estu ĉe l' junulino**, ; **vin invitas kuri**, ; **ilin akceptu zorge**, ; **sorcĥistoj!**)) ?

(&Majore: /Sur monteto apud maro (x:;) la paŝtisto pri l' ondaro (x:; **Klare blua milda mar'** ; **Glate flata estas la ondar'**.)

'2 klare-blua, milda, glata, ..... kaj apenaŭ eĉ lulata .....

'3 per tuŝeto de zefiro, ..... sin delectis kun admiro .....

'4 kaj ekkriis: "Ho, plezuro ..... devas esti marveturo!" .....

'5 Nu, li siajn ŝafojn vendis, ..... por la mono ŝipon mendis, .....

'6 ĝin per figoj ŝargis plena, ..... velis for **kun kor' serena.** .....

'7 Li kun kor' serena velis, ..... sed subite, jen, ribelis .....

'8 tiuj ondoj milde glataj: ..... Ili sturmis nun, pelataj .....

'9 de sovaĝa ventovipo, ..... ĝis la flankon de la ŝipo .....

'10 ili rompis per breĉigoj, ..... dronis ŝipo, dronis figoj. ....

'11 Nudan vivon la povrulo ..... savis helpe de tabulo. ....

'12 lam poste li ekaŭdas, ..... ke la maron iu laŭdas: .....

'13 "Kiel blua, milda, glata, ..... kaj apenaŭ eĉ lulata .....

'14 kaj apenaŭ eĉ lulata ..... de zefiro, kiel flata!" .....

'15 De kolero li ekboldas: ..... "Jes, ĝi flatas, figojn volas!" .....



13/35





# La baladoj de Ezopa Saĝo (3)

- & La lasta fablo de Ezopo, 377.
- & La leono, la vulpo kaj la azeno, 190 aŭ 310.
- & *La leporo kaj la testudo*, 259.
- & La lupo kaj la ŝafido, 186.
- & La malsana korvo, 85.
- & La mensogema paŝtisto, 125.
- & **La monedo kaj la pavoj, 222.**
- & La mulo kaj la di-statuo, 217.
- & La muso kaj la rano, 290.
- & **La oreloj de la leporo, 290.**
- & La ovojn, 351.





# & La monedo kaj la pavoj:

(#: <:37> (/dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mimi; mifa soso somi mire; dore doTi LaLa LaSo; (#Rekantaje: do mire do dodo Ti La; LaTi dodo dore mimi; mifa somi mire do; do mire do dodo Ti La a))x6 )+(&:

'1 La monedo pavis vante, ; fanfaronis arogante, (; la kunulojn ĝi neglektis,)x

(x:; **Zorgojn ĝi foje forgesas ; La kunulojn ĝi neglektis ; Pavoplumojn prenis ĝi ; Zorgojn ĝi foje forgesas.**)

'2 kial al ĝi plu ne indajn, ; en la korto ĝi kolektis, ; inter siajn plumojn plektis, ; pavoplumojn elfalintajn, .....

'3 kaj orgojlis kaj afektis ; kun la alpruntita havo, ; siajn paŝojn ĝi direktis ; inter pavojn, kiel pavo. ....

'4 Krude tiuj ĝin akceptis, ; de ĝi prenis tire-ŝire ; la pav-plumojn, eĉ difektis ; ĝiajn proprajn. Hejmenire .....

'5 tre mizere ĝi aspektis. ; Tie ne estis por ĝi loko, ; la kunuloj malrespektis ; kaj forpelis ĝin kun moko. ....

'6 (Kurta gloro pavo-vosta ; iĝis por ĝi multekosta.)x .....





# & La oreloj de la leporo:

(#: <:29> (/La dolre mi mi mire fare mi do; do reldo dodo doLa dodo doTi;

(#Rekantaje: La dore mi mi re falre mi; doTi reTi do Lado Ti Ti La a) )x10 )+(&:

'1 La le2onon vundis besto korna. ;  
Li o2rdonis en kolero morna:

(x:; **Venu mastrino en la2 ĉen'** ;  
**Prenu mian manon en firma ten'**.)

'2 "Ĉiu best' havanta korn-armilon ;  
iru el la regno en ekzilon!" .....

'3 Do elmigris cervo, kapreolo, ;  
kapro, ŝafo, ĉamo, kaj, ĉe kolo .....

'4 la orelojn longajn kuŝiginte, ; por  
ke tiuj ne elstaru pinte, .....

'5 (iris en ekzilon — la leporo. ;)x  
.....

'6 La sciuro miris: "He, baptano! ;  
Kien do vi iras?" "Al lontano." .....

'7 "Kial?" "Pro la kornoj." "Ho,  
ĉieloj! ; Tiuj longaj estas ja oreloj!"

'8 La leporo diris:

"Ĉu por tio ; povas  
esti ia garantio,

.....

'9 ke ne nomos iu  
el kaprico, ;  
favorĉaso, strebo  
aŭ malico .....

'10 la orelon  
longan longa  
korno? ; Tie ĉi  
evitus min la  
dormo." .....







17/35

# La baladoj de Ezopa Saĝo (4)

& **La plej granda kulpulo, 1972.**

& La prognozo, 377.

& La putoro kaj la kokinoj, 135.

& La rano kaj la bovo, 119.

& La ranoj volas reĝon, 319.

& **La simio kaj la delfeno, 372.**


& La societo de Pluto, 203.

& La spuroj, 290.

& La tornistro, 348.

& **La ursfelo, 407**

& *La vulpo kaj la gruo, 170 aŭ 410.*





# & La plej granda kulpulo (1):

(#: <1,7:29> (/La dore mi mi milre falre mi do; do redo dodo doLa do Ti; (#Rekantaje: La dore mi mi re falre mi; doTi reTi do Lado Ti Ti La a))x68 )+(&:

< Vicordon modifitan de versoj havas strofoj &M kaj originalan havas &O. Baladestro elektu mem. Strofo &M'62 duoblas.>

(&M: '1 /Kiel sub Trojo la2 a2rgivojn ; per sagoj, estingante multajn vivojn, (x:; **Venu mastrino en la2 ĉen'** ; Prenu mian manon en firma ten'.)

'2 Apollo kolerante pafis ; tiel la bestojn foje trafis .....) ?

(&O: '1 /Kiel sub Trojo la2 a2rgivojn ; Apollo kolerante pafis (x:; **Venu mastrino en la2 ĉen'** ; Prenu mian manon en firma ten'.)

'2 per sagoj, estingante multajn vivojn, ; tiel la bestojn foje trafis .....)





# & La plej granda kulpulo (2):

'3 amasa mort' per plago fata ; pro la koler' de dio nekonata. ....

(&M: '4 Kunvokis la leono la palavron ; kaj diris: "Ĉie vidas vi kadavron, ....

'5 Rigardu, ho regatoj! Mia korto! ; rigardu, la popolon falĉas morto. ....) ?

(&O: '4 Kunvokis la leono la palavron ; kaj diris: "Ho regatoj! Mia korto! ....

'5 Rigardu, ĉie vidas vi kadavron, ; rigardu, la popolon falĉas morto. ....)

'6 Nin certe dio punas per ĉi plago ; pro ies krima ago. ....

'7 Ni serĉu lin, kaj mortu tiu unu, ; ke l' dio senkulpulojn plu ne punu! ....

'8 Tial kunvokis mi la konferencon, ; ke ĉiu sian konsciencon ....

'9 esploru, kaj konfesu devkonscie, ; se ion kulpis li malpie. ....

'10 Kaj, ĉar falema estas ĉiu besto, ; eĉ mi mem, malgraŭ mia reĝmajesto, ....

(&M: '11 jen, mi komencas mian kulpo- liston: ; Mi manĝis multajn ŝafojn, eĉ paŝtiston, ....

'12 Mi manĝis multajn ŝafojn, mi ne negas, ; kelkfoje eĉ paŝtiston, mi ne negas, ....) ?

(&O: '11 jen, mi komencas mian kulpo- liston: ; Mi manĝis multajn ŝafojn, mi ne negas, ....

'12 Mi manĝis multajn ŝafojn, mi ne negas, ; kelkfoje eĉ paŝtiston, ....)

'13 kaj poste: Mi kelkfoje koleregas; eĉ tio povas esti, ke mi regas ....

'14 iom rigore, eĉ se juste. ; Nu, ĉion, kion havis mi surbruste, ....

'15 mi diris rekte, diris sen ekskuzo, ; kvankam okazis ja, ke muso ....

'16 sub miajn ungojn foje venis, ; kaj, ĉar stomako mia ĝuste plenis, ....

'17 mi la besteton, petegantan time, ; forkuri lasis grandanime. ....



# & La plej granda kulpulo (3):

'18 Vi scias, poste tiu ĉi museto, ; por liberigi min el reto, .....

'19 la maŝojn el dankem' tramaĉis. ; Al mia reĝa koro vere plaĉis, .....

'20 ke tiel amas min la modestuloj... ; Do, konfesinte laŭ la postuloj, .....

'21 nun mi atendas, juĝu min severe! ; Volonte mi dediĉos min ofere .....

'22 por vi, popol' amata, do decidu! ; Aŭ eble ni laŭvice vidu .....

'23 (ĉies kulpliston, ĉar prefere ;)x .....

'24 mortu farinto de l' plej granda kulpo." ; Paroli nun anoncis sin la vulpo: .....

'25 "Ho, nia reĝa moŝto, ĉu vi degnas ; tiel paroli? Vi plej juste regnas, .....

'26 kaj estas de skrupuloj turmentata ; nur tial, ĉar tro delikata .....

'27 estas animo via. Ĉu vi pekas ; manĝante tiujn ŝafojn, kiuj blekas .....

'28 netolereble? De ilia flanko ; koncernas vin eĉ danko, .....

(&M: '29 ke ilin vi honoras per devoro! ; Kaj la paŝtisto! Jen teroro, .....

'30 tiran' reganta bestojn tiu estas, ; pro ties manĝ' neniuj ja protestas! .....) ?

(&O: '29 ke ilin vi honoras per devoro! ; Kaj la paŝtisto! Tiu estas .....

'30 tiran' reganta bestojn per teroro, ; pro ties manĝ' neniuj ja protestas! .....



# & La plej granda kulpulo (4):

'31 Sed tiu mus'! Bonfaro de l' bonfaroj! ;  
Fablistoj tion gloros dum centjaroj!" .....

'32 Tiel la vulpo. Tondre ekaplaŭdis ;  
flatistoj. Oni laŭdis .....

'33 la reĝon pro l' noblega sentimento, ; kaj  
eĉ la vulpon pro la elokvento. ....

'34 (Nu, la ruzulo tion aŭdis ;)× .....

'35 kun granda ĝojo kaj kontento: ;  
Pretertiriĝis tiel la atento .....

'36 pri lia propra kulpo kaj malico. ; Li  
haste kaŝis sin en lasta vico. ....

'37 La urso diris nun kun ĝema voĉo: ;  
"Min mordas konscienciproĉo. ....

'38 Kun homo longe mi amikis, ; la tagojn,  
noktojn kune ni pasigis, .....

'39 (komuna estis nia manĝo, loĝo. ;)× .....

'40 Li dormis foje, sidis mi apude, ; kaj  
vidis, ke altrude .....

'41 sidiĝis al li sur la buŝo ; impertinenta  
muŝo. ....

(&M: '42 Por gardi lian  
dormon mi forpelis ; tiun  
ĝenulon. Nun ekŝvelis  
.....

'43 mia kolero, ĉar l'  
estaĵ' aroga ; reflugis  
ĉiam, kaj per peco roka  
.....) ?

(&O: '42 Por gardi lian  
dormon mi forpelis ; tiun  
ĝenulon, sed l' estaĵ'  
aroga .....

'43 reflugis ĉiam. Nun  
ekŝvelis ; mia kolero, kaj  
per peco roka .....

'44 mi murdis ĝin, sed  
ankaŭ kapo ; amika  
frakasiĝis per la frapo.  
.....





# & La plej granda kulpulo (5):

'45 Jen mia kulp' kaj mia malfeliĉo! ;  
Ĉar ve, krom la doloro pro l' perdiĝo  
.....

'46 de la amiko, ĉiuloke, ĉiuepoke .....

'47 (oni diradas pri mi moke, ;)x .....

'48 ke estas mi amiko stulta, ; ol kiu  
estas de valor' pli multa .....

'49 la saĝa malamik'. Mi homon ;  
amatan perdis, kaj renommon!" .....

(&M: '50 La povra urs' amare ploris,  
ploris, ; oni aliajn kulpojn ne esploris,  
.....

'51 ĉiuj rigardis lin kompate, ; li do  
tranaĝis glate. ....) ?

(&O: '50 La povra urs' amare ploris,  
ploris, ; ĉiuj rigardis lin kompate, ....

'51 aliajn kulpojn ne esploris, ; li do  
tranaĝis glate. ....)

'52 Sekvis la tigro. Li de l' lipoj lekis ; la  
sangon (ĵus li manĝis) kaj eklekis: .....

(&M: '53 "Kiu akuzos?" Brilis dentoj  
blankaj, ; kaj mutis ĉiuj, spiromankaj. ....

'54 L' okuloj verde fosforeskis. ; Lia  
demando sen respondo restis. ....) ?

(&O: '53 "Kiu akuzos?" Brilis dentoj  
blankaj, ; l' okuloj verde fosforeskis. ....

'54 Kaj mutis ĉiuj, spiromankaj. ; Lia  
demando sen respondo restis. ....)

(&M: '55 Pantero, linko, sovaĝbestoj  
pluraj ; prezentis sin, sed senriproĉe  
puraj .....

'56 ĉe ili same koro kaj lieno ; pruviĝis.  
Kaj sin savis per mieno ....) ?

(&O: '55 Pantero, linko, sovaĝbestoj  
pluraj ; prezentis sin, sed koro kaj lieno  
.....

'56 ĉe ili same senriproĉe puraj ; pruviĝis.  
Kaj sin savis per mieno ....)

'57 Kaj sin savis per mieno ; humila  
ankaŭ la hieno. ....



# & La plej granda kulpulo (6):

'58 La vico de l' azeno tiam venis, ; kiu sin jene ekzamenis: .....

('59 "Mi kulpis foje, mi bedaŭras pente, ; la freŝa herbo logis tente, .....) ?

(&O: '59 ("Mi kulpis foje, mi bedaŭras pente, ;)x .....

'60 ho ve, ke tio okazis. ; lam mi preter Delfoj pasis, .....

'61 malsatis jam turmente, ; la freŝa herbo logis tente, .....

(&M: '62a kaj jen, mi min delogi lasis: ; ho ve, ke tio okazis. ....

'62b Mi malsatis jam turmente, ; herbkvastojn kelkajn manĝis, senatente, .....) ?

(&O: '62 kaj jen, mi min delogi lasis: ; Herbkvastojn kelkajn manĝis, senatente, .....) )

'63 ke rajton mi ne havis ja por tio." ; La lup' leviĝis kun indigna krio: .....

'64 "Ho, ĉu do iam kulpon pli punendan ; vi aŭdis? Manĝi herbon fremdan! .....

'65 Kaj eĉ, en Delfoj! Eble la herbkvastoj ; estis plej propra hav' de l' sanktaj pastroj! .....

(&M: '66 Por tia krimo, fratoj, puno sola ; ekzistas: mort'! kaj en kolero bola, .....


'67 la dio inter nin la plagon sendis!" ; Jen do, pro kio la azeno pendis. ....) ?

(&O: '66 Jen do, pro kiu, en kolero bola, ; la dio inter nin la plagon sendis! .....

'67 Por tia krimo, fratoj, puno sola ; ekzistas: mort'!" — Kaj la azeno pendis. ....) )



25/35



# & La simio kaj la delfeno:

(#Sigmundskvæðið: <:31> (/mi mi dolre mi mi mido re fa; mimimi mimi mido re fa;  
(#Rekantaje: mire do; do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; So3mi mimi  
re do) )x12 )+(&:



'1 /Simio2n havis homo foje, ; tre ofte kun ĝi ludis ĝoje,  
(x: **En la ĉen' ; Dancu nun trankvile ; Ĉiuj ni trankvilas  
; Jen en amika ĉen' ; Dancu nun trankvile.)**

'2 ĝin por amuzo kaj plezuro ; kunportis eĉ dum  
marveturo. ....

'3 Sed jen, tempesto eksovaĝis. ; La ŝipo dronis. Homoj  
naĝis. ....

'4 Dum la simio pene provis ; elnaĝi, ĝin delfeno trovis, ....

'5 kaj, ĉar ĝi homo ĝin rigardis, ; bonvole ĝian vivon  
gardis, ....

'6 surdorsen prenis ĝin por porto ; al seka kaj sekura  
bordo. ....

'7 Nu, kiam ili al haveno ; Pireo (rodo de Atheno) ....

'8 alvenis, la delfen' scivolis: ; "Ĉu Athenano?" "Jes!" —  
parolis ....

'9 tre fanfarone la simio, — ; "eĉ el plej nobla familio!" ....

'10 "Do, vi Pireon konas bone?" ; "Pireon? Certe, kiel do  
ne? ....

'11 Li estas ja al mi tre kara ; amiko, plej familiara!" ....

'12 Ko[lere] [pro l' men]sogo, la delfeno ; droni[gis la  
a]mikon de haveno. .... )



## & La ursfelo (1):

*(#: <:37> (/dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mimi; mifa soso somi mire; dore doTi LaLa LaSo; (#Rekantaje: do mire do dodo Ti La; LaTi dodo dore mimi; mifa somi mire do; do mire do dodo Ti La a))x11 )+(&:*

'1 /Du kompanoj en drinkdomo ; pri ĉasadoj fanfaronis, ; ĉe l' apuda tablo homo ; miris, miris, kaj proponis:

**(x:; Zorgojn li foje forgesas ; Li pri felo tro promesas ; nek la urson venkis li; Zorgojn li ĝoje forgesas.)**

'2 "Aŭdu, ho ĉasistoj gloraj, ; urso tra l' arbaro vagas. ; Dudek kvin monerojn orajn ; mi por ties felo pagas." .....

'3 Ĉar la monon tiuj sentis ; jam tintadi en la poŝo, ; ĉion bonan ili mendis, ; drinkis ĝis la lasta groŝo. ....

'4 Poste ili venko-certe ; iris al la ĉasekskurso. ; Ili iris, ĝis averte ; unu kriis: "Jen la urso!" .....



## & La ursfelo (2):



(x:; **Zorgojn li foje forgesas ; Li pri felo tro promesas ; nek la urson venkis li; Zorgojn li ĝoje forgesas.**)

'5 Urso, jes, sed ve, giganta, ; alta super arbotrunkoj, ; sovaĝege atakanta ; per la ulnolongaj ungoj. ....

'6 Terurite, la kompanoj ; ne kuraĝis lanci, pafi, ; ĵetis ĉion el la manoj ; kaj klopodis nur sin savi. ....

'7 l' unu grimpe sin defendis, ; rampis sur arbeg' ĝis pinto, ; la alia sin etendis ; sur la tero, kaj mortinto ....

'8 sin ŝajnis (ĉar laŭdire ; urs' ne manĝas mortan homon). ; Rigidiĝis li senspire, ; ne montrante vivsimptomon. ....

'9 l' urso venis kaj lin flaris ; ĉe orelo, nazo, buŝo, ; sed nenion al li faris: ; Iris for sen ia tuŝo. ....

'10 Kuŝis li kun turna kapo ... ; Nun descendis la kolego, ; ŝercis, ĝoje pri l' eskapo: ; "Kion diris la ursego?" ....

'11 "Ho, ĝi flustris ĉe orelo ; ion, kion ni ne lernis: ; Tiam trinku je ursfelo, ; kiam vi la urson sternis." .... )





29/35



# La baladoj de Ezopa Saĝo (5)

& La vulpo kaj la kapro, 272 aŭ 296.

& *La vulpo kaj la korvo*, 248.

& Laŭ ĉies plaĉo, 473 aŭ 682.

& Leonfelo, 115.

& Libero, 174.

& Plena ventro, 217.


& Rifuzo de Ezopo submetiĝi al Lidia reĝo Krezo, 145.

& Sincere, 145.

& Ŝafoj kaj lupoj, 232.

& Unueco, 186.

& Vento kaj suno, 318 aŭ 366





# & Laŭ ĉies plaĉo:

(#: (#Unua: <:43> mi /doTi domi mido Ti Ti;re doLa LaSi Lado Ti Ti;mi doTi domi mido Ti Ti;re doLa doTi LaSi La La; (#Rekantaĵe: mi domi so somi re do; fami doTi Lado Ti Ti; mido domi somi re; mi domi so somi re do o))x11

'1 ((&Unua: La /patro kun la juna filo ; azenon portis al foiro. (x:;) La patro en la selo sidis, ; la filo la azenon gvidis. (x: &L; **Laŭ ĉies plaĉo ni iru ; Gravas kion ili diru ; Kun azeno marŝas ni ; Laŭ ĉies plaĉo ni iru.**) ?

(&Dua: La /patro kun la juna filo ; azenon portis al foiro. (x:; &L) La patro en la selo sidis, ; la filo la azenon gvidis. (x:; &L))

'2 Survoje venis hom' renkonte, ; kaj tre indignis: "Estas honte! ..... Jen viro en la sel' komforta, ; dum marŝas la infan' malforta." .....

'3 La patro, je l' indigna voĉo, ; sin savi volis de riproĉo, ..... de la azeno do descendis ; kaj rajdi sian filon sendis. ....

'4 Sed ree venis hom' renkonte, ; kaj tre indignis: "Estas honte! ..... Jen knabo en la sel' komforta, ; dum marŝas la aĝul' malforta." .....

'5 La knabo, je l' indigna voĉo, ; sin savi volis de riproĉo, ..... do saltis de l' azena dorso. ; Nun ambaŭ marŝis, sen rimorso. ....

? (#Dua: <:31> o;mi /doTi domi mido Ti Ti;re doLa LaSi Lado Ti Ti;mi domi so somi re do; fami doTi domi re re; mido domi somi re e;mi domi so somi re do)x22 )+(&:

'6 Sed venis homo, miris multe, ; kaj kriis: "Vere, estas stulte! ..... Dum vi lacigas vin per marŝo, ; promenas la azen' sen ŝarĝo." .....

'7 Do, kion fari? Patro, filo ; demandis sin kun maltrankvilo. .... Interkonsilis kaj decidis ; Nun ambaŭ en la sel' eksidis. ....

'8 Sed ree venis hom' renkonte, ; indignis ege: "Estas honte! ..... Sur povra besto ŝarĝ' duobla! ; Fi, kia kruelec' malnobla!" .....

'9 La du, en malesper', per ŝnuroj ; l' azenon ligis ĉe la kruroj, ..... kaj ĝin per stango traŝovita ; plu portis kun klopodo ŝvita. ....

'10 Sed venis hom' kaj ĝis eksceso ; ridante kriis: "Jen frenezo! ..... Azenon vivan oni portas! ; Ho ve, mi de ridego mortas!" .....

'11 La patro diris al la filo: ; "Mi estas vere sen konsilo: ..... Ĉu la azenon do mortigi, ; aŭ nin ĉe kol' sur branĉon ligi?" .....

# & Laŭ ĉies plaĉo:

(#: (#Unua: <:43> mi /doTi domi mido Ti Ti;re doLa LaSi Lado Ti Ti;mi doTi domi mido Ti Ti;re doLa doTi LaSi La La; (#Rekantaĵe: mi domi so somi re do; fami doTi Lado Ti Ti; mido domi somi re; mi domi so somi re do o))x11

'1 ((&Unua: La /patro kun la juna filo ; azenon portis al foiro. (x:;) La patro en la selo sidis, ; la filo la azenon gvidis. (x: &L:; **Laŭ ĉies plaĉo ni iru ; Gravas kion ili diru ; Kun azeno marŝas ni ; Laŭ ĉies plaĉo ni iru.**) ?

(&Dua: La /patro kun la juna filo ; azenon portis al foiro. (x:; &L) La patro en la selo sidis, ; la filo la azenon gvidis. (x:; &L))

'2 Survoje venis hom' renkonte, ; kaj tre indignis: "Estas honte! ..... Jen viro en la sel' komforta, ; dum marŝas la infan' malforta." .....

'3 La patro, je l' indigna voĉo, ; sin savi volis de riproĉo, ..... de la azeno do descendis ; kaj rajdi sian filon sendis. ....

'4 Sed ree venis hom' renkonte, ; kaj tre indignis: "Estas honte! ..... Jen knabo en la sel' komforta, ; dum marŝas la aĝul' malforta." .....

'5 La knabo, je l' indigna voĉo, ; sin savi volis de riproĉo, ..... do saltis de l' azena dorso. ; Nun ambaŭ marŝis, sen rimorso. ....

? (#Dua: <:31> o;mi /doTi domi mido Ti Ti;re doLa LaSi Lado Ti Ti;mi domi so somi re do; fami doTi domi re re; mido domi somi re e;mi domi so somi re do)x22 )+(&:

'6 Sed venis homo, miris multe, ; kaj kriis: "Vere, estas stulte! ..... Dum vi lacigas vin per marŝo, ; promenas la azen' sen ŝarĝo." .....

'7 Do, kion fari? Patro, filo ; demandis sin kun maltrankvilo. .... Interkonsilis kaj decidis: ; Nun ambaŭ en la sel' eksidis. ....

'8 Sed ree venis hom' renkonte, ; indignis ege: "Estas honte! ..... Sur povra besto ŝarĝ' duobla! ; Fi, kia kruelec' malnobla!" .....

'9 La du, en malesper', per ŝnuroj ; l' azenon ligis ĉe la kruroj, ..... kaj ĝin per stango traŝovita ; plu portis kun klopodo ŝvita. ....

'10 Sed venis hom' kaj ĝis eksceso ; ridante kriis: "Jen frenezo! ..... Azenon vivan oni portas! ; Ho ve, mi de ridego mortas!" .....

'11 La patro diris al la filo: ; "Mi estas vere sen konsilo: ..... Ĉu la azenon do mortigi, ; aŭ nin ĉe kol' sur branĉon ligi?" .....



# & Leonfelo:

(#: <:23> (/mi mimi soso soso lala soofa;fa mimi mimi rere mimi redo;  
(#Rekantaĵe: mi3mi mimi so so; lala sofa mi mi redo Tido La a))x5 )+(&:

'1 /Leonon la urbloĝantar' de Kyme  
; neniam vidis, eĉ de malproksime.


(x:; **Kantu kaj ridetu ; kaj fiere  
tretu la rakonton jen.**)

'2 Jen, ia besto kun leonharfasko ;  
(ĉu estis ĝia propra aŭ nur  
masko?) .....

'3 aperis sur la strato, hurle muĝis,  
; ke terurite ĉiu hom' rifuĝis: .....

'4 "Leono!". Sed fremdul' el  
regiono, ; kie konata estas la  
leono, .....

'5 ĝin draŝis draste, kaj post la  
forpelo ; klarigis: "Nur azen' en  
leonfelo." .....



# & Unueco:

*(# Skrímslu kvæði: <:31> (/do dodo rere re;re re3do  
Ti3La La lSo; mi mimi mimi mi;mi dodo fa3mi re ldo;  
#Rekantaĵe: reerere re3re reerere re3re; re3do  
TiLa La So; dodo dore mimi fami re do h) )x6 )+(&:*

'1 /Kverelis ĉiam la ; infanoj de kampu2l' , ;  
kaj li per peto, per ; riproĉo, per postu2l'

(x: **Pasas la vintro, venos somero ; teron  
por kultivo ; Kreskos bele huma la  
deklivo.**)

'2 klopodis por la kreo ; de interkompren' , ;  
sed sensukcesa restis ; lia tuta pen' . .....

'3 Finfine li elpensis ; ion por admon': ; El  
vergoj ligis faskon, ; kaj, post ties don' .....

'4 al ili, diris: "Jen, ; ĝin rompu per la man'!"  
; Nu, vane provis ĝin ; infano post infan' , .....

'5 La vergojn li transdonis al ; ili nun po  
pec' , ; kaj ili, nature, rompis ; ilin kun  
facilec' . .....

'6 La patro diris: "Same ; fragilaj sen  
konkord' ; vi estas, filoj, dum ; unueco estas  
fort'." .....





# Dankon!

*Martin kaj amikoj de Granda Kurlo*



<http://tretis.tone.se>



36/35



# & La cerbo (1):

(#A: < 1479 paŝoj, 14 minutoj.> <:29> La /dore mi mi mire fare mi do; do redo dodo doLa dodo doTi; (#Rekantaĵe: La dore mi mi re falre mi; doTi reTi do Lado Ti Ti La a) ?

(#N: < 1275 paŝoj, 14 minutoj.> <:25> a;Mi /mimi rere TiTi doTi La Mi;Mi LaLa TiTi dodo TiLa Ti Mi;Mi mimi rere TiTi doTi La Mi;Mi LaLa TiTi dodo doTiLa Ti La) )x51 ) + (&

'1 La /reĝo de la bestoj malsanegis, ; langvoro kuŝis. Lin la vulpo flegis,

(x:;

(&A: **Venu mastrino en la2 ĉen'** ; **Prenu mian manon en firma ten'**.)

?

(&N: **Leono jen malsata devas manĝi** ; **La vulpo favorata povas aranĝi.**)

)

'2 la ruza vulpo, lia favorato. ; La reĝo diris: "Murdas min malsato, .....

'3 ĉar ĉasi, ve, nun mankas al mi forto. ; Nur vi min povas savi el ĉi sorto. ....

'4 En la arbaro vivas cervo bela; via sagaco, via lang' miela, .....

'5 mi estas certa, havos la rimedon ; havigi al mi tiun bonan predon." .....

'6 La vulpo, do, tre ruzan planon teksis. ; La cervon li vizitis, genufleksis, .....

'7 kaj diris: "Grandan novon mi alportas: ; Malsanas la leono, preskaŭ mortas, .....


'8 eĉ pri la posteulo jam disponis: ; "Ne taŭgas la pantero — li rezonis — .....

'9 "ĉar tro impeta, nek la stulta apro, ; nek, kvankam barba, la ventkapa kapro, .....

'10 nek la vantega, sangsoifa tigro, ; la urson malindigas granda pigro, .....

'11 la cervo — jen! Li estos reĝo bona, ; kun longa vivo, kun statur' impona, .....

'12 kun kornoj branĉaj, kiuj la popolon ; timigos." — Mi ne tiru la parolon, .....





## & La cerbo (2):

'13 vi estas elektita! Reĝ' vi estos! ; Ho, se en la arbaro vi regnestros, .....

'14 ne lasu for la vulpon, la sindonan, ; kiu alportis ĉi sciigon bonan. ....

'15 Mi kuras nun. Adiaŭ, glora cervo! ; La malsanul' atendas min por servo. ....

'16 Mi estas lia konsilant' intima, ; kia mi estos, jam de tag' proksima, .....

'17 al vi, mi kredas, se vi uzi povas ; ĉi kapon oldan. Ej! Ĉu vi ne trovas .....

'18 do oportune fari al li viziton? ; De l' lastaj vortoj havus vi profiton." .....

'19 La cervon trompis la mensog' belsona, ; kaj li ekiris al la grot' leona. ....

'20 Lin la leon' atendis jam avide, ; sed li atakis iom trorapide, .....

'21 en granda hast' maltrafis sian celon, ; kaj ungis al li sole la oreilon. ....

'22 La cervo, terurita, kun ĉi vundo ; eskapis, kuris al arbara fundo. ....

'23 "Ej, ej!" La vulpo malespere gestis. ; La multaj penoj, jen do, vanaj estis. ....

'24 Murmuris la leono pro ĉagreno, ; lia stomak' murmuris pro malpleno. ....

'25 Li fine petis la ruzulon vee, ; ke ian finton li elpensu ree. ....

'26 La vulpo streĉis al si la kranion: ; "Nu, malfacile! sed mi provos ion." .....

'27 Li iris do, la planon li plu kovis, ; post longa voj' la cervon li retrovis. ....

'28 Ĉi tiu kriis al li ĉe l' renkonto: ; "Ĉu vi kuraĝas veni do sen honto, .....

'29 farinte al mi la intrigan krimon? ; Forportu de mi vian vulp-animon, .....

'30 kaj faru reĝon el stultul' alia!" ; La vulp' respondis kun mieno pia: .....

'31 "Vi certe havas koron tre poltronan, ; kaj kalumnias la amikon bonan! .....

'33 Kiel mortanta patro bonan filon, ; li volis vin altiri, kaj konsilon .....



## & La cerbo (3):

'34 bonvolan doni al vi oreflustre: ; Kiel vi gardu vian regnon ĝuste. ....

'35 Sed — honte! — vi brutale fortiriĝis, ; ke eĉ orelo via ekŝiriĝis. ....

'36 Li tre indignas, ke vi lin ne fidas, ; kaj, kion fari, li jam eĉ decidas ....

'37 la lupon fari reĝo, la friponon! ; Ho ve, vi portis al ni ĉi malbonon! ....

'38 Se vi almenaŭ venus, por riparo ; de via granda peko kaj eraro! ....

'39 Mi ĵuras je la arboj, fontoj, steloj, ; kaj tiel donu al mi la ĉielo, ....

'40 ke mi vin servu, kiel estas vere, ; ke li vin amas, amas plej sincere, ....

'41 ke sen intenc' malbona en la koro ; li estas al vi plena de favoro, ....

'42 reĝigi volas vin, ĉar li vin ŝatas ..." ; Kaj tiel plu. La vulpo, klaĉas, flatas, ....

'43 la cervo, fine, de l'alloga trompo ; moliĝas, kaj ekiras ... al la tombo. ....

'44 Ĉar en la faŭko de la grot', subite ... ; Nu, tiutage tre bonapetite ....

'45 la reĝo manĝis, karnopecojn glute, ; la ostojn maĉe, manĝis preskaŭ tute ....

'46 la internaĵojn, dum la vulpo staris, ; rigardis kaj salivo-verŝe flaris. ....

'47 Ho! Jen la cerb'! Li ŝtele ĝin konsumis, ; kaj sin tiamaniere premiumis. ....

'48 Sed la leono, kun ekscita nervo, ; ekserĉas nun la cerbon de la cervo. ....

'49 "Kie ĝi estas, kie?" Sen konfuzo ; respondas lin la majstro de la ruzo, ....

'50 ridante kun grimaco mokrikana: ; "Ho reĝo, via serĉo estas vana: ....

'51 "Ties kranio cerbon ne entenas, ; kiu dufoje en ĉi groton venas." .... )